

# La Progreso

REDACTIE-  
COMITÉ  
G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 2.— per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

W. F. KRUIT  
H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## FAKAJ LINGVOJ

II  
Por ĉiutaga uzado la ordinara lingvo sufiĉas. Sed la homoj kiuj plej multe povas profiti el uzado de lingvo internacia, ne estas la ordinara homoj, sed la fakuloj. Profiti signifas propagandi. Oni ja ne kredu, ka fakuloj propagandos Esperanton por poste uzi ĝin. La afero estas inversa: se ili povas uzi la lingvon, tiu uzo jam per si mem estas propagando. Ni do zorgu, ke ili trovu la lingvo preta, ankaŭ por faka uzado. Ni — tio estas la kompetentuloj aŭ amatoroj en la diversaj fakoj. Kaj kion fakuloj bezonas en Esperanto, tio estas nur fakaj terminoj: teĥnikaj kaj sciencaj nomoj kaj esprimoj.

Jam antaŭ pluraj jaroj kelkaj kompetentuloj komprenis la grandan valoron de fakaj terminaroj kaj okupis sin pri ilia ellaboro. Tiel estiĝis i.a. „Marista Terminaro” de Rollet de l’Isle, „Terminologio de Arĥitekturo” de Azorin, „Medicina Vortaro” de d-ro Briquet, „Filozofia Vortaro” de Kamaryt, „Benamingen op het gebied der Verlichtingskunde” kun tradukoj de la lingvoj germana, angla, franca kaj Esperanta.

Tamen, konsiderante la multecon de la diversaj fakoj en la vivo sur scienca, teĥnika, sociala, ekonomia, religia, politika, sporta k.m.a. terenoj, oni komprenas, ke tio estis nur la unuaj paŝoj sur la vojo al kompletigo de la lingvo. Kaj konsiderante, ke la moderna vivo estas tute trapektita

per ideoj el diversaj fakoj, ni konvinkigās, ke la bezono pri fakaj terminaroj konstante pli sentiĝas, kaj ke plimultiĝas ankaŭ la nombro de la diversaj fakoj mem.

Por iom plenumi tiun bezonon U.E.A. ekkentreprenis laŭdindan taskon: eldoni terminarojn en tre oportuna formo kaj tia malgranda amplekso, ke ili facile povas veni en la manojn de ĉiu esperantisto, kiu profesie aŭ amatore okupas sin sur iu tereno aŭ nur pro kleriĝaj motivoj deziras akiri scion pri io ajn. Jam aperis muzika, aeronautika, radio-, armea, fervoja, kudra kaj trika, lega terminaroj kaj eĉ pri infanludoj. Laste aperis la unua parto de nova marista terminaro. En kelkaj el ili diversaj bildoj servas al tuja kompreno. Sendube la serio estas daŭrigota.

Sed, por ke la tasko entreprenita de U.E.A. havu la intencitan efikon, du aferoj estas urĝe necesaj: Unue, ĉiu klera esperantisto havigu al si la de temp’ al tempo aperantajn verketojn kaj utiligu ilin plejeble vaste: por si mem, ĉe sia instruado kaj eĉ propagande inter fakuloj. Kaj due: la kompetentuloj inter ni, en kunlaboro kun diversnaciaj kolegoj, ellaboru pluajn terminarojn. Ni opinias, ke la dua punkto grandparte dependas de la unua, aliavorte: se oni vaste diskonigās la utilon de tiaj libretoj kaj instigas al aĉeto, fakuloj kaj eldonistoj tuj pretas provizi nin per novaj eldonoj.

G. J. D.

Ĉu vi jam antaŭmendis „TRA LA LABIRINTO”  
por la favora prezo f 4.90?

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

### DE CORRELATIEVEN. 11.

De correlatieven, die uitgaan op „a” zijn voornaamwoorden; zij komen in de plaats van bijvoeglijke naamwoorden en worden dan ook slecht bijvoeglijk gebruikt, vandaar de uitgang „a”. Zij duiden op een eigenschap of kenmerk van een zelfstandigheid en horen dus bij een zelfstandig naamwoord. Zij ondergaan dezelfde veranderingen als het bijbehorende zelfst. naamwoord, d.w.z. bij meervoud een „j” en als bepaling zonder voorzetsel een „n”.

*Ia* = een onbepaalde soort of eigenschap. *Ia gazeto detale raportis pri la kongreso* = D’een of andere soort krant rapporteerde uitvoerig over het congres. *Mi aĉetis por mia filo ian kostumon* = Ik kocht voor mijn zoon het een of ander soort pak. *Iaj fungoj ne estas manĝeblaj* = Sommige (soorten) paddestoelen zijn niet eetbaar. *Mi ne ŝatas iajn librojn* = Ik houd niet van sommige (soorten) boeken.

*Kia* = welke soort of eigenschap? *Al kia eklezio li apartenas?* = Van welke kerk (katolika, protestanta, ortodoksa) is hij lid? *Kian ĉapelon ŝi portas?* = Wat voor soort hoed draagt zij? *Kiaj estas viaj amikoj?* = Hoe zijn uw vrienden? Opmerking: na „kia” is het antwoord steeds een bijvoeglijk naamwoord, bijv.: *Li apartenas al la katolika eklezio. Ŝi portas modernan ĉapelon. Miaj amikoj estas ĝentilaj.*

*Kia* wordt ook gebruikt als betrekkelijk voornaamwoord en duidt dan op een reeds genoemde soort of eigenschap, bijv.: *Mi tre ŝatas instruajn verkojn, pri kiaj vi ofte parolas* = Ik houd veel van leerzame werken, waarover u vaak spreekt. *Kun tiaj homoj, kiaj estas viaj amikoj, mi ne interrilatas* = Met zulke mensen, zoals uw vrienden zijn, ga ik niet om. *Tiaj mebloj, kiajn vi aĉetis, estas por mi tro multekostaj* = Zulke meubelen, zoals u kocht, zijn voor mij te duur.

Opmerking: Deze laatste voorbeelden zijn samengestelde zinnen, d.w.z. zin-

nen, die bestaan uit meer dan één volzin. Deze volzinnen worden ieder apart ontleed. Als voorbeeld de laatste zin: *Tiaj mebloj, . . . , estas por mi tro multekostaj* (gezegde: *estas tro multekostaj*; onderwerp: *tiaj mebloj*, dus geen „n”) . . . , *kiajn vi aĉetis. . .* (gezegde: *aĉetis*; onderwerp: *vi*; bepaling zonder voorzetsel: *kiajn*, dus met „n”).

*Tia* = zo’n soort, zulk een. *Tia estas la konduto de la knabo* = Zo is het gedrag van de jongen. *Li estas tre kapabla; bedaŭrinde, mi ne estas tia* = Hij is zeer bekwaam; jammer, ik ben niet zo. *Ne skribu al via patro tiajn leterojn* = Schrijf niet zulke brieven aan je vader.

*Ĉia* — elke soort, allerlei. *Ne ĉia libro estas rekomendinda* = Niet ieder soort boek is aanbevelenswaardig. *Ŝi meritas ĉian laŭdon* = Zij verdient elk soort (alle) lof. *Mi ŝatas ĉiajn kunvenojn* = Ik houd van allerlei vergaderingen.

*Nenia* = geen enkele soort. *Nenia ĵurnalo raportis pri la kunveno* = Geen enkel (soort) dagblad gaf een verslag over de vergadering. *Li legas nenian libron ĝis la fino* = Hij leest geen een (soort) boek tot het eind. Opmerking: correlatieven op „a” verwart men wel met die op „u”. Nog enkele voorbeelden: *Ia* (d’een of andere soort, katolika, socialista, Esperanta) *gazeto raportis pri tio. Iu* (hier is geen sprake van een soort) *gazeto raportis pri tio. Kian* (welke soort, sciencan, historian, poezian) *verkon vi ŝatas? Kiun* (hier is geen sprake van een soort; men laat bijv. enkele boeken zien) *verkon vi ŝatas?*

### TER VERTALING. Opgave 5

Sommige bloemen ruiken heerlijk. Hoe is de kleur van dat pak? Het is grijs. Hoe studeert uw zoon? Dank U, heel goed. Lees toch niet zulke boeken; in de bibliotheek zijn allerlei goede werken. Zo’n esperantist, als Meijer, heb ik nog nooit ontmoet. Hoe is het weer? Als het zo is als gisteren, mogen we niet klagen. Van welke soort vergaderingen houdt u het meest? Ik bezoek graag allerlei bijeenkomsten. Wat lelijk heb je deze brief geschreven; zo kun je hem niet verzenden.

Vertaling van opgave 3.

Tiu, kiu lernis iom pri 1) la Esperanto-historio, facile povas imagi 2), ke la unua kongreso havis grandan signifon por 3) la Esperanto-movado. La plimulto 4) de la esperantistoj el tiu tempo ankoraŭ neniam parolis 5) kun eksterlandanoj. Tial 6) multaj el 7) ili vizitis Boulogne surmer, vidindan francan 8) banlokon 9). Tie la kongreso okazis; ĝi komenciĝis 10) la okan de aŭgusto milnaŭcent-kvina kaj daŭris ok tagojn. La unuan fojon centoj da esperantistoj el dudek landoj kunvenis. Oni atentis 11), ke la vojaĝado ne okazis tiel facile kiel 12) nun. Sendube estis inter ili, kiuj supozis 13), ke oni ne bone povas 14) kompreni unu la alian. Ankaŭ d-ro Zamenhof kaj lia edzino 15) vizitis ĉi tiun kongreson. Nek lia malpli bona sanstato, nek la altaj vojaĝkostoj povis reteni lin. Per belega parolado la aŭtoro de Esperanto malfermis ĉi tiun lernigan 16) kunvenon. Salutinte ĉiujn, li parolis pri la granda diferenco inter ĉi tiu kaj aliaj kunvenoj. Ĉi tien oni venis por paroli pri la unuaj batalintoj por la mondlingvo; multaj el ili certe ĉeestus, se ĉiuj ankoraŭ vivus. Post tio ĉiuj partoprenantoj ekstaris 18) kaj pensis momenton pri la jam mortintaj pioniroj. Ĉe la fino de sia 19) malferma parolado Zamenhof voĉlegis la konatan poemon „Preĝo sub la verda standardo”. La voĉo de la parolanto pli kaj pli malfortigis. Estis morte silente en la salono, neniu movis sin, por ke oni povu 20) aŭdi la lastajn vortojn. Tiam Zamenhof ek-sidis laca 21). Ĉi tiu estis la plej bela tago de lia vivo. Post tio la diskutoj komenciĝis 10). Ju pli multe oni parolis, des pli flua fariĝis la lingvo. Tia kongreso estas neforgesebla. Estas do dezirinde, ke ĉiu esperantisto multe legu pri tio.

1) Niet: *de*; men vergelijke: *Mi lernis multe pri* (over) *la klasikuloj* — *Mi lernis multe de* (van) *la klasikuloj*. 2) Niet: *imagi sin*: *imagi* = *zich voorstellen*. 3) Niet: *pro*; d.i. vanwege. 4) Niet: *plejmulto*; bij vergelijking van twee zelfstandigheden gebruikt men *pli* (*malpli*). Er is sprake van twee groepen, 1: die reeds met buitenlanders had gesproken en 2: die nog niet met buitenlanders had gesproken. 5) Ook: *estis parolinta*. Niet: *parolintaj*; *plimulto* is enkelvoud. 6) Ook: *do*. Niet: *tiam ankaŭ*, d.i. een woordelijke vertaling van „dan ook”, waarvan de

werkelijke betekenis in deze zin is: dus, daarom. 7) Niet: *de*; in de uitdrukking „een van” gebruikt men „el”. Men vergelijke de Ned. zin „een uit velen”. 8) Niet: *fransan*. 9) Ook: *banurbon*. Niet: *franca banloko*; hier is sprake van een bijstelling; een bijstelling komt in dezelfde naamval te staan als het zinsdeel, welke zij aanvult. Dat dit een naam is, is van geen belang. 10) Niet: *komencis*; „*komenci*” is een overgankelijk werkwoord: *La instruisto komencas la lecionon*, maar: *La leciono komenciĝas*. 11) Ook: *pripensu*. 12) Ook: *estis... facile*. Niet: *estis... facile*. Men zegt: *La vojaĝado estis facile* of: *La vojaĝado okazis facile*. Na „*esti*” is *facile* een bijvoeglnaamwoord; het zegt iets van een zelfst.naamw. (vojaĝado) door middel van het kopelw.woord „*esti*” Na „*okazi*” zegt *facile* iets van een handeling; dit is dus een bijwoord. 13) Ook: *pensis, opiniis*. 14) Niet: *povus, povis, povas*; na „*supozi*” volgt hier de indirecte rede. 15) Niet: *sia*; het onderwerp van de zin is „d-ro Z. kaj lia edzino”. „*Sia*” kan niet voorkomen in een onderwerp. 16) Niet: *instruigan, lerneman*; men zegt: *lernema studento*, maar: *lerniga libro* (kongreso, leciono). Ook: *instrua*. 17) Niet: *rememoris la aŭskultantojn*; *rememori* = zich weer herinneren, *rememorigi* = een ander weer doen herinneren (maken, dat een ander weer denkt aan). 18) Ook: *leviĝis, levis sin*. 19) Niet: *lia*; als men de zin ontleedt, komt „*sia* malferma parolado” voor de dag als een bepaling en er is sprake van een bezit van het onderwerp, dus *sia*. 20) Niet: *povus*; na „*por ke*” gebruike men de aanvoegende wijs, er is immers sprake van een wens. 21) Niet: *lace*; d.i. op een vermoede manier gaan zitten. Men moet hier de gesteldheid van het onderwerp uitdrukken tijdens de handeling, dus: een bepaling van gesteldheid.

Beoordeling: Astor 8, J. v. G. te A. 5, Tilio 7, K. S. te Z. 5, D. K. te Z. 8, J. R. te A. 9, G. B. te Z. 8, D. V. te H. 7, E. A. B. te A. 9, J. A. te O. 6, M. J. K. te Z. 7, J. F. v. D. te A. 7, J. F. D. te L. 8, C. v. B. te S. 8, J. J. t. H. N. 6, P. W. te G. 6, P. W. te Z. 7, A. A. D. te Z. 7, G. A. te R. 7, G. B. N. te Z. 5, A. J. G. te D. 8, J. J. B. te D. 8, E. R. M. te S. 8, D. P. te A. 8, J. A. V. te U. 6.

## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.  
Weren  
Doorzettingsvermogen  
Ruim baan maken  
Moederziel alleen  
Toegankelijk  
Ik zou graag willen weten  
Aan het gezicht onttrekken  
Wat je op het hart hebt  
Hinderpaal  
Tot de slotsom komen  
De oren spitsen  
Uit de weg ruimen  
Op de hoogte komen  
Zie hem te bewegen  
Geestdriftige bewoordingen  
Vrienden in de nood, honderd in een lood  
Verband leggen tussen  
Ontwijkend antwoord  
Beheersen  
Er lopen onaangename praatjes  
Opofferingsgezindheid  
Een bevoorrechte

### Opgave 4.

1. Een groep heesters onttrok haar aan het gezicht, zodat zij alles kon af luisteren. Zij spitste de oren om geen woord te verliezen en zo kwam zij op de hoogte van de plannen der samenzweerders. 2. In geestdriftige bewoordingen schetste hij de vorderingen der techniek, maar hij vergat ook niet de aandacht te vestigen op het gevaar, dat het zou kunnen gebeuren, dat uiteindelijk niet de mens de techniek, maar de techniek de mens zou beheersen. 3. Ken je me juffrouw A.? Er lopen onaangename praatjes omtrent haar. Ik zou graag willen weten wat waar en wat niet waar is. 4. Zeg mij wat je op het hart hebt; misschien kan ik je helpen. Met een beetje goede wil en wat doorzettingsvermogen kunnen vele hinderpalen uit de weg worden geruimd. 5. Je ontwijkende antwoorden kunnen mij niet bevredigen. Als ik verband leg tussen je woorden en je daden, kom ik tot de slotsom, dat je een huichelaar bent. 6. Groot was de moed en bewonderenswaardig de opofferingsgezindheid van hen, die vieren voor onze vrijheid. 7. Deze kamers waren alleen toegankelijk voor enkele bevoorrechten. Alle anderen werden streng geweerd. 8. Een juichende menigte was aanwezig bij hun terugkeer. Met veel moeite gelukte het de politie ruim baan voor hen te

Ne allasi  
Energio  
Malobstrukci la vojon  
Tute sola kaj senhoma  
Alirebla  
Mi volonte sciuz  
Malvidigi  
Kio premas al vi la koron  
Obstaklo  
Konkludiĝi  
Streĉi la aŭdon  
Forigi  
Sciigi  
Klopodu inklinigi lin  
Vervaj vortoj  
Cent amikoj en mizero havas pezon de funtero  
Rilatigi kun  
Evita respondo  
Estri  
Estas malagrablaj onidiroj  
Sinoferemo  
Privilegiulo

maken. 9. Toen hij al zijn bezittingen had verbrast, stond hij moederziel alleen en verlaten in de wereld. Geen van zijn vroegere vrienden bekommerden zich om hem. Vrienden in de nood, honderd in een lood. 10. Zie hem te bewegen met ons mee te gaan. Hij kent die omstreken en weet veel van de natuur. Wij zullen in hem een goede leidsman hebben.

### Vertaling van opgave 3.

1. Kiam mi citis la nomon de tiu viro, ŝia vizaĝo malsereniĝis kaj la rideto ĉirkaŭ ŝia buŝo transiris en malestimano esprimon. 2. Kiam venos la okazo, ĉu vi tiam inklino akcepti funkcion en la estraro de via sekcio? 3. Venontan monaton niaj kursoj komenciĝos. Ne pli longe hezitu, sed kaptu la okazon (por) lerni Esperanton. 4. Ne pro scivoleco mi faras al vi tiujn demandojn. Mia nura celo estas malplekti la konfuzaĵojn kaj helpi vin reordigi viajn aferojn. 5. Estas nekompreneble, ke tiu fikomercisto povis trompi tiom da homoj. Multaj kredis lin bonhavulo (riĉulo), sed efektive (reale) li estas tiom malriĉa, kiom muŝo preĝeja. 6. Li estas iu, kiu scias kion li volas, kiun hezigitas nek malfacilaĵoj, nek danĝeroj. Li multe postulas de aliuloj, sed ankaŭ sin mem li ne indulgas. Lia ekzemplo entuziasmigas ĉiun, kiu interrilatas kun li. 7. Ŝi fiksas siajn



## POR PROGRESANTOJ

J. v. Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 5. Vertaal in Esperanto:

MOEDER.

Wat niemand vermag, dat gelukt soms de moeder. Waar alles afstuit op de verhardheid der ziel, daar ontoedoit deze soms bij het zien van de moeder. En eigenaardig is de blijvende invloed, die zij heeft. Wij hebben grote denkers, wereldberoemde geleerden gekend, die nooit iets zouden doen zonder hun moeder te raadplegen en als men dan dat doodeenvoudige vrouwtje zag, dat moeder heette, dan steeg de verwondering tien top en dan begreep men wel niet, maar zag men de wonderbare geheimzinnige werking, die van de moeder uitgaat.

(F. Domela Nieuwenhuis.)

Vertaling van opgave 3.

EN LA PROKSIM(EO) 1) DE 2)

KILIMANDSCHARO

Ĉe 3) la lunlumo la afrikaj noktoj estas tre klaraj, sed kiam ĉe nuba ĉielo la luno ne sendas 4) siajn afablajn radiojn super la tero, la noktoj tie estas peĉenigraj 5). Je la oka vespere 6) ĉie jam regas la nokta silento 7). La portistoj, surkape kaj surŝultre transportinte 8) la pakajojn de la vojaĝanto, jam volvas sin en siajn (lit)kovrilojn 9), kiujn ili laŭ siaj kutimoj tiras super la kapon.

La vojaĝanto, tramigrante 10) la afrikajn arbarojn, kunprenas sian tendon el veltolo 11) kun akcesoraĵoj. Li tiam povas konstrui ĝin 12) kia ajn li deziras 13). Ankoraŭ malforte brulas la ardantaj (ligno)ŝtipoj 14) de la kampfajro 15) kaj iliaj flamoj

iĝas pli kaj pli malgrandaj 16). Tiam oni iras ankaŭ al la lito kaj grimpas sub la kontraŭmoskitan gazon kaj aŭskultas 17) la misterajn noktajn sonojn. Sen rimarkebla transiro 18) oni tiam eniras la regionon de la sonĝoj 19) kaj sonĝas pri la stepoj kaj ilia 20) reganto 21), la leono. Ĉu oni vere tie aŭdas 22) iun? 23) Sed ne, ekster la tendo ĉio estas kvieta kaj paca.

1) Ook: *najbareco*, *ĉirkaŭaĵo*, *apudeco*. 2) Het lidwoord voor een eigenaam laat men gewoonlijk onvertaald. 3) Ook: *dum*. 4) Ook: *igas*, *lasas* *brilli*. 5) Ook: *tre*, *ege*, *tute*, *gagate*. 6) Ook: *en la vespero*. 7) Ook: *kvieto*. 8) Ook: *kiuj sur la kapo transportas*. 9) Met richtings-n. 10) Ook: *kiu migras tra*. Niet: *vagas* (= zonder doel). 11) Niet: *lak-* of *vakstolo*. De samenstelling „veltoltendo” is niet mooi. 12) Ook: *por ke li povu starigi ĉi tiun*. 13) Ook: *volas*, *ŝatas*. 14) Ook: *blokoj*. 15) Ook: *tendofajro*. 16) Ook: *konstante*, *daŭre*. 17) Ook: *aŭdas*. 18) Niet: *ne rimarkate* = men wordt niet bemerkte. 19) Niet: *revoj*. 20) Niet: *sia*; het onderwerp is „oni”. 21) Niet: *sinjoro kaj mastro*. De betekenis is „heerser”. 22) Beter dan de veel gebruikte vorm „ne aŭdas”. 23) Ook: *unu*.

Beoordeling: F. B. R. te A. 8; F. v. d. M. te U. 8; C. J. P. te Z. 7; G. A. te R. 9; P. U. W. te Gr. 6; E. R.-M. te S. 7; W. A. D. te Gr. 7; Kortbirdo 8; A. A. D. te Z. 6; J. J. B. te D. 6; A. J. G. te D. 6; M. J. K. te Z. 7; J. R. te A. 8; E. A. B. te A. 8; G. B. te Z. 7; D. K. te Z. 7; K. S. te Z. 7; D. V. te H. 8; Astor 7; A. P. M. L. te G. 9; L. B.-B. te W. 8.

okulojn sur la buŝo de la parolanto kaj kaptis ĉiun el liaj vortoj. Ĉu tio, kion rakontis la oratoro, ne estis ŝia propra historio? 8. Kiam la rajdanto (rajdisto) estis kuratinginta nin, li ekbridis sian ĉevalon kaj petis al ni pri informoj. Sed pro tio, ke ni ne konfidis lin, ni ŝajnis nin stultuloj. 9. Kiam li revenis el tiu ĉambro, li tremis kiel tremelo. Moke ni demanis al li, ĉu li eble vidis fantomojn. 10. Ĉu vi komprenas kiel iu, kia li, povis esti deklarata senkulpa? Aŭ ĉu aplikigas en ĉi tiu okazo: al tiu ĉio sedas, kiu monon posedas?

Bonvolu korekti: paĝo 30a, dua kolono, 4a lino: *preĝeĝa* d.e. *preĝeĝa*. Sur la sama paĝo, 4a frazo de la traduko: *La famo estis* d.e. *La famo estas*.

Beoordeling: Astor 9; K. S. en Z. 6; D. K. en Z. 8; D. V. en H. 8; M. J. K. en Z. 7; E. A. B. en A. 9; J. R. en A. 9; E. R.-M. en S. 7; J. J. B. en D. 7; A. J. G. en D. 8; J. A. V. en U. 5; D. v. W. en A. 7; D. P. en A. 5; P. M. W. en G. 6; J. A. en O. 6; F. v. d. L. en A. 5; L. B. B. en W. 9; J. F. v. D. en A. 7; J. F. D. en L. 9.

## OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Koncerne la miskomprenojn pri kelkaj koniferaj nomoj, kiujn ni klopodis klarigi en nia artikolo „Abio - piceo - pino” en la jan. numero, ni ricevis la ĉi suban opiniesprimon de kompetentulo, s-ro C. Stöp-Bowitz, biologo en Oslo:

„Pri *pino* kutime ne regas konfuzo. Ĝi estas la longpingla arbo el la genro kun la latina nomo *Pinus*, kies ordinara specio (= „speco” en la preciza scienca signifo estas *P. silvestris*, germane: *Kiefer* 1).

„Pri *abio* kaj *piceo* regas ĝenerala konfuzo. Zamenhof evidente formis tiujn nomojn el la latina *Abies* kaj *Picea*, sed li mem ne havis klaran ideon pri la diferenco, kio evidentiĝas el liaj tradukoj de la vortoj en la Fundamento. Tiuj tradukoj nome ne klare montras al kiuj arboj rilatas tiuj nomoj. Similaj malklaraĵoj ekzistas en la Fundamento ankaŭ rilate multajn bestonomojn. Devus tamen esti klare, ke *abio* = *Abies* (ordinara specio: *A. pectinata*, germane: *Edeltanne*, *Weistanne* aŭ simple: *Tanne*, mezeŭropa arbo, kies pingloj estas grizaj sube) 2), dum *piceo* = *Picea* (ordinara specio: *P. excelsa*, germane: *Fichte*, *Rottanne*, nordeŭropa arbo, kies pingloj estas helverdaj sube) 3). Malfeliĉe en tre malnovaj botanikaj libroj, de la tempo antaŭ ol bone fiksiĝis la botanika scienca nomenklaturaro, regis ioma konfuzo rilate la du nomojn, sed nuntempe ĉio estas klara, kaj sekve ankaŭ la signifo de la koncernaj Esperantaj vortoj devus nun esti klara.”

1) Ned.: grove den (Red.).

2) Ned.: zilverspar (Red.).

3) Ned.: fijne spar (Red.).

Ni tre dankas s-ron Stöp-Bowitz pro lia kompetenta klarigo, kiu plene konfirmas nian opinion esprimitan en la jan. numero. Nederlandanoj ankorau aparte atentu, ke do la germana *Tanne* ne estas nia *den*, malgraŭ la simileco inter ambaŭ nomoj, sed ia *spar*: *zilverspar*.

Pri la nomo de nia lando s-ro M. C. Butler en Kingston on Thames supozas, „ke estas ĝuste diri *Nederlando*, kaj pri la provincoj diri *Holando* (kun unu „l”). Povas esti, ke originale ĝi signifas *Hol-lando*. Tamen, pli bone diri *Holandanoj* (pritraktante la nomon *Holand-gero* kiel radi-

kon, same *Islando*, *Irlando*) kaj nomi la loĝantojn *Holandanoj*.”

En tio s-ro Butler pravus, ke la radiko *Holand'* nun ne estas dividebla en *ho* kaj *land*, sed ĉar origine la vorto, estiĝis el *hol* kaj *land*, ellaso de la dua „l” por nederlandanoj ŝajnas ia kripligo.

G. J. D.

Iu legantino opinias la jenan frazon strangaĵo: *Estas la devo de ĉiu viro, zorgi pri siaj edzino kaj infanoj*. Rezonante, ke ne ĉiu viro havas edzinon kaj infanojn, ŝi skribus: *Estas la devo de ĉiu edzo, zorgi.....*, laŭ ŝi, analoge al la frazo: *Jansen kaj lia edzino foriris* (Jansen en zĵn vrouw vertrokken).

Ŝia opinio, ke la unua frazo estas strangaĵo ne estas ĝusta. La signifo de la vorto *vrouw* (virino) en la dua frazo ne estas sama, kia de la vorto *man* (viro) en la unua frazo, pri analogeco do ne estas parolo. Estas vere, ke en la nederlanda lingvo oni ofte uzas la vortojn *man* (viro) kaj *vrouw* (virino) en la signifo de *echtgenoot* (edzo) kaj *echtgenote* (edzino). Tamen vi ne opinii, ke oni ĉiam devas uzi la vortojn *edzo* kaj *edzino* kiel tradukojn de la vortoj *man* (viro) kaj *vrouw* (virino), ankaŭ ne se oni aludas familianojn. Oni faru tion nur, se la nederlandaj vortoj *man* (viro) kaj *vrouw* (virino) en vero signifas *echtgenoot* (edzo) kaj *echtgenote* (edzino). Tio estas la okazo en via frazo: *Jansen en zĵn vrouw* (virino) *vertrokken*, kaj vi prave tradukis: *Jansen kaj lia edzino foriris*.

Se oni tradukus: *estas la devo de ĉiu viro zorgi pri siaj virino kaj infanoj*, vi pravus. Via rezono, ke la vorto *viro* estas erara, pro tio, ke ne ĉiu viro havas edzinon kaj infanojn, ne estas logika, ĉar laŭ la sama rezono oni devus traduki: *estas la devo de ĉiu edzo, kiu estas ankaŭ patro, zorgi pri siaj edzino kaj infanoj*, ĉar ne ĉiu edzo havas infanojn. Vi rigardu tiajn frazojn singarde. Imagu, ke oni kolektis aron da elmigrantoj kun iliaj familioj en marŝipon. Ĉu la kapitano farus eraron, se li ordonus: „Ĉiu viro havas la devon, zorgi pri siaj edzino kaj infanoj dum la vojaĝo.” Tute ne. Ĉu instruisto erarus, se li admonus: „Ĉiu knabo obeu la gepatrojn.” Laŭ via rezono vi korektus: *Ĉiu filo.....* ĉar vi supozas, ke eble ĉeestas orfoj. Kie estas la fino?!  
H. K.

## NIA AFERO

Batu la najlon ree kaj ree!  
Fine ĝi firme fiksiĝos.  
Ligu la homojn: lingve, ideoj;  
Kora kompreno kreigiĝos  
Paŝon post paŝo palpe progresos  
Ni tra mallumo peniga.  
Iom post iom tamen sukcesos  
Nia laboro heliga.  
Dume, fidela nia anaro  
Jam en modesta limigo  
Kreas mondeton sen lingva baro,

Ĝuas en vasta kunligo  
Koran interkonsentan kunagon,  
Amon de homo al homo;  
Ĝuas la feliĝigan imagon  
De paca regno sen nomo.  
Nia afero estu konfeso  
De tuthomara frataro,  
Kiu batalas por la progreso,  
Por bona penso kaj faro.

Oscar Bünemann.

---

## KIO OKAZIS EN 1949!

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.

G. P. de Bruin

(Daŭrigo)

### RADIO

Na nombro de Esperanto-disaŭdigoj plimultiĝis per la ĉiusemajna kvaron-hora elsendo de la sveda stacio Stockholm. La elsendoj de Budapeŝt ĉesis, verŝajne pro manko de aŭskultantoj. Ankaŭ la monatan priesperantan elsendon de V.A.R.A. (Hilversum, Nederland) oni ĉesigis. Ĉiutage elsendis Parizo, Praha kaj Sofia. Ĉi lastan ni ne povis aŭdi. Apartan mencion meritas la raportoj prikongresaj de Franca Radio, kaj la monataj interesaj artplenaj elsendoj de la Verda Stacio (Ĉeĥoslovakio).

Estas bedaŭrinde, ke la esperantistoj ne pli aŭskultas la Esperanto-programojn kaj ne sufiĉe skribas al la radiostacioj. Tio tre endanĝerigas la pluekziston de la por la movado tre gravaj Esperanto-elsendoj.

### POŬTO

En Aŭstrio aperis Esperanto-poŝtmarko, kiu per verda stelo, la vorto Esperanto kaj oliva branĉo bele figuras nian idealon. La ĉeĥoslovaka poŝto eldonis serion da ilustritaj poŝtkartoj, inter kiuj troviĝas kvar kun Esperanto-teksto.

### PRAKTIKA UZADO.

Grava fakto estas la en Viskadalen okazinta Esperantlingva kurso pri „sociaj problemoj kaj institucioj en Svedio”. Ĝin organizis Lab. Esp.-Asocio kaj la Laborista Kleriga Asocio. Svedaj sindikatoj finance subtenis la entreprenon. La usona Socialista Laborista Partio eldonis Esperantlingvan gazeton „S.L.P.-Folio” por diskonigi siajn ideojn alilande.

La Nederlanda Sindikata Konfederacio N.V.V. aperigis ciklostilitan „Informa Bulteno” en Esperanto.

En Ĉeĥoslovakio oni publikigis presitan monatan bultenon pri politikaj kaj ekonomiaj faktoj koncerne tiun landon, sub la titolo „Esperanto-Servo”.

Krome oni informis la alilandan publikon pri la *Konstitucio* kaj pri la *Lerneja Reformo* per Esperantlingvaj libretoj (jam menciitaj sub „Literaturo”).

Pri postmilita Polio temas la broŝuro „Nuntempa Polio”, eldonita de la Asocio de Esperantistoj en Pollando.

„Social Credit Coordinating Centre” en Anglio propagandas siajn ideojn per ampleksa broŝuro „Maŝinoj, mono kaj mondpaco”, de C. Marshall Hattersley (ne senpaga, sed mendebla ĉe libroservoj).

Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke „Department of Public Information” de Unuiĝintaj Nacioj mendis 1000 ekzemplerojn de la en „Amerika Esperantisto” aperinta *Universala Deklaracio de Homrajtoj*.

La Skandinavia Aer-Sistemo (S.A.S.) eldonis tre belan, ilustritan prospekton. K.L.M. (Reĝa Aertrafika Kompanio) publikigis duan eldonon de sia „Historio de K.L.M.” La Londona Kooperativa Societo okaze de la antaŭkongreso en sia urbo aperigis Esperantlingvajn afiŝon kaj prospekton. (Daŭrigo).

## KION DIRAS LA ALIAJ!

La ĉeĥoslovaka „Esperantista” publikigas tre interesan prelegon de s-ro Karel Pič pri Esperantaj neologismoj. La artikolo estas tro ampleksa por resumi ĝin kelkalinie. Anstataŭe ni ĉerpos el ĝi kelke da rimarkindaj esprimoj, kiuj havas instruan valoron por ĉiuj:

„Se ekzistas ia diferenco inter Esperanto kaj la t.n. lingvoj vivantaj, ĝi estas kalkulebla ekskluzive al la juneco de Esperanto unuflanke kaj la maljuneco de ĝiaj konkurantoj aliflanke.”

„Vere internaciaj vortoj apenaŭ ekzistas. Eĉ ekz. *futbalo*, konata preskaŭ ĉie en la mondo, fakte estas komprenata de relative nur tre malmultaj homoj. 500 milionoj da ĉinoj ne konas *futbalo*, sed *bi-ĉio*, kaj pluaj milionoj da malajlingvanoj parolas pri *raga*. Tial la orientaj nacioj ne emas al neologismoj en Esperanto. Ili pli multe ŝatas la malnovajn pure Esperantajn vortojn, kiujn ili konsideras pli fidindaj ol la nove enportitajn. Per tiu ĉi lingva konservativeco ili bridas la respektivajn ekscesojn kaj la troan moviĝemon de kelkaj eŭropaj esperantistoj.”

„Cetere la riĉigo de la lingvo, tiom celata de Kalocsay kaj liaj ideanoj, restas nura fantazio sen samtempa riĉigo kaj altigo de la ĝeneralaj lingvokonaj kaj lingvokulturo. Estas sence peli la ar-

tefaritan literaturan lingvan evoluon antaŭen, se la vera lingvoevoluo ne transpaŝis ĉe la plimulto de la esperantistaro la limojn de la Fundamento.”

„Ne estas hazarde, ke la plej ĉarma, belsona kaj perfekta lingvaĵo Esperanta estas la lingvaĵo de diversaj prilingvaj kaj prigramatikaj artikoloj kaj studaĵoj Esperantaj.”

„Oni amu novajn vortojn. Sed ankoraŭ pli multe oni amegu la malnovan gramatikon. Ĉar la vortoj estas kvazaŭ vesto. Ili venas kaj malvenas. Ili alpreniĝas kaj forpreniĝas. La korpo ene tamen restas. Sed male ĉe la gramatiko, kiu estas kvazaŭ la vivo mem. Se ĝi foriĝus, restus ja nenio.”

„Multaj naivaj parolantoj de Esperanto eĉ nun sincere kredas, ke la Lingvo Internacia nepre bezonas *retikulo*, ĉar ankaŭ la franca lingvo ĝin posedas; aŭ estas certaj, ke ĝi ne povus vivi sen *brodkasto*, ĉar la angla lingvo ne vivas sen ĝi.”

„Ĉefneologismemulo Kalocsay ne eraru! Tio, kion li propagandas kaj kion li kredas progreso, estas fakte nur infana malsano. Tamen ĝi estas neevitebla kaj necesa. Ĝi estas lingva maturiĝado. Sed la malsanoj foriĝos. Kaj oni trovas ne nur, ke ekzemple *preskaŭ* estas pli bela ol *presk*, sed eĉ, paradokse, ke ĝi estas pli mallonga ol *presk*.”

## BIBLIOGRAFIO

S. Tokunaga. Trad. K. Nakagaki. Eldonis Togo-Ŝobo, Tokio.

Prezo: Us. Dolaro 0,20.

Ĉi tiu 46-paĝa libreto enhavas multajn klarigojn de Esperantaj vortoj en la japana lingvo. Krom tio ankaŭ Esperantlingvaj klarigojn de japanaj vortoj kaj moroj.

Estas interese legi pri ili, ĉar en la okcidento oni malmulte scias pri la la orientaj landoj, kies moroj kaj lingvoj tiom diferencas de la niaj. Sed en bone manipulita Esperanto oni ne rimarku la diferencan inter la naciaj lingvogrupoj. La stilo en nia „tutmonda” Esperanto estu ĉie simila kaj klara kaj leganta ne divenu dum la legado el kiu lingvo fontas la traduko.

En ĉi tiu verketo, bedaŭrinde, mankas multo kaj tio supozeble fontas el la tradukita lingvo kiu influis la tradukinton.

Tre ĝena estas la forlaso de vortoj, kie ili estas nemankipovaj. Precipe la artikolo estas nevenkebla malfacilaĵo,

samkiel la persona pronomo. La interpunkcio ofte estas erara. Plurajn frazojn oni devas legi dufoje, antaŭ kiam klariĝas la enhavo. Alia vortlekto aŭ vortsinsekvo plurfoje farus la frazojn pli klaraj. Multegaj japanaj vortoj ne ricevis Esperantan tradukon kaj per tio malhelpas fluan komprenon. Iufoje ili estas en nacia formo, aliafoje kun Esperanta finigo. Gramatikaj eraroj estas: (2) *unu-jen po tago* (= po unu jen dum tago); (4) *restis nevideble* (= a); (8) *iri la juĝejon* (= al la); (9) *glitema vojo* (= glitiga) k.t.p. Kion pensi pri la sekvantaj frazoj? (11) *Nu jam atingota, ni ripozo cigaredon da fumado*. (13) *Mi havas rikolti 120 hĵoo da rizo*. (28) *la 4an tagon de l' interigo*. (Ĉu la interigo daŭris jam 4 tagojn?) k.t.p.

La rimarkoj estas tro multaj. Ni ne povas sufiĉe ripeti: Kontroligu antaŭ eldono la manuskripton pere de eksterlanda kompetentulo. La tradukinto kaj la legontaro tiel evitos multan ĉagrenon.

J. van Scheepen.

